★

# Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Karaj gesamideanoj,

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno

Temo

## Merkatika funelo kaj kvalita esperanta reklamo. Kiel esti bona advokato

Antaŭ ni aĉetos ion, ni ĉiuj trairas diversajn fazojn de tiel nomata "merkatika funelo" (angle “marketing funnel”). Tiu procezo validas por ĉiu produkto kaj servo kaj esperanto ne esceptas. Kompreni kiel la fazoj de funelo aspektas kaj kiel la trairado tra ĝi funkcias helpas al ĉiuj, kiuj emas efike informi pri esperanto kaj reklami ĝin.
Advokato estas unu el la fazoj kaj ni rigardos kune kiel ni povas esti bonaj advokatoj de esperanto en nuna mondo.

**Prelegos:** **Josef Kalčík**

**Lingvo:** Esperanto

**Kiam:** la 8-an de oktobro je 18.00 (UTC+2)

**Kie:** **La renkontiĝo okazos rete per Jitsi**

Jen la ligilo: https://meet.jit.si/moderated/43f7d1610134c4b80b45e5560715ace9e1916f8261e962d99dea0449e8962abd

Ni rekomendas, ke vi uzu aŭskultilojn kun mikrofono por preventi eĥon. Sed ne estas bezonata, vi povas uzi mikrofonon en via portebla komputilo (notebook).

★

## Ni rekomendas

- La 17an — 19an de oktobro 2025 Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Havířov-Těrlicko
- 1-a — 8-a de aŭgusto 2026 111-a Universala Kongreso de Esperanto, Graz, Aŭstrio

★

# Novaj libroj

**Ĉapitroj el romaa historio**
Oldřich Arnošt Fischer esperantigis kaj eldonis libron de Jana Horvathova pri la historio de la romaoj nialande. Jana Horvathova estas direktorino de Muzeo de Romaa Kulturo, celo de unu el la kongresaj ekskursoj, jam nun disvendita. La leganto povas ekkoni la historion de nia minoritato, kiu vivas kun ni dum jarcentoj, ofte kruele persekutata.
Prezo: 170 Kč.
**Angla-Esperanta-Ĉeĥa etvortaro pri Lernado kaj Laboro, Homa vivo kaj loĝado, Lingvo kaj komunikado.**
Aŭtoroj: Ilona Koutny, Miroslav Malovec
Ĉeĥa versio de ĉiuj ĝis nun eldonitaj temvortaroj de profesorino Ilona Koutny. Entutu ĝi enhavas pli ol sep mil esprimoj.
Prezo: 250 Kč

Ambaŭ librojn vi povos mendi en nia retbutiko ĉe www.esperantobrno.cz/index.php/cz/obchudek . Sendokostoj per Zasilkovna aŭ Balíkovna estas 100 Kč (temas pri liverado en Ĉeĥio). La libroj estos aĉeteblaj ankaŭ dum kongreso en Havířov.

★

# Cetera programo en oktobro

La 15an **Sur flugiloj de fantazio – Karl Friedrich May kaj František Flos** – Oldřich Arnošt Fischer, la klubejo
La 22an **Instruado de Esperanto al nevidantoj** – Aranka Laslo kaj Nedeljka Ložajioć (RS), rete per Zoom, je la 19a h.
La 29an **Literaturo en Esperanto** – Miroslav Malovec, la klubejo

# Programo en novembro

La 5an **Mondaj heredaĵoj en Ĉeĥio** – Petr Chrdle, rete per Jitsi
La 12an **Konfuziloj** – Milan Kolka, la klubejo
La 19an *Ankoraŭ ne agordita, komuna renkontiĝo kun klubo el Glivice*, rete per Zoom, je la 19a h.
La 26an **Sicilio kaj Italio** – Jana Zigal, la klubejo
Antaŭkristnaska renkontiĝo okazos la 10an de decembro.
Programo ĝis la jarfino estas jam agordita krom komunaj retaj renkontiĝoj kun poloj. Tamen mi petas vin, ke vi jam pripensu vian kontribuon al programo komence de venonta jaro.

★

Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvánek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:

- na našich webových stránkách (https://www.esperantobrno.cz/index.php/eo/aprogramo),
- na naší stránce na Facebooku (https://www.facebook.com/esperantobrno/)
- a na aEventa servo (https://eventaservo.org/o/EO_Brno)

Nahrávky proběhlých přednášek a některých dalších programů naleznete na našem kanálu na Youtube (https://www.youtube.com/channel/UCQLClocHDdrb9TaHggRM5cA).

Náš program budeme nadále zveřejňovat na našem webu, Facebooku a na Eventa servu. Zejména Eventa servo považujeme za hlavní zdroj informací o esperantských akcích. Na webu esperanto.cz budeme zveřejňovat pouze celostátně významné akce (jako je třeba oslava výročí klubu) a on-line schůzky.

Milan Kolka
prezidanto